MJC, 27, RUE DE LA RÉPUBLIQUE
54000 NANCY

COURS EN 16 LECONS: 138 F


CASSETTE D'ACCOMP^t: 35 F

Ⓜ Priatentu: votre chèque au nom de
J.P. COLNOT - CCP: 1123 38 J NANCY

DE LA VARBADO !



ALIĜIGU ALMENAŬ
1 (unu!) LERNANTON!



noti+Bonvolu noti+Bonvolu noti+Bonvolu noti+Bonvo

★ Plurlanda renkontiĝo en Lindau/
Konstanca Lago

BELO aranĝas plurlandan renkontiĝon de 4a ĝis 6a de majo. Prelegos Claude Gacond, La Chaux-de-Fonds. Kursoj, ekzamenoj, ekskursoj. Adr.: Bavara Esperanto-Ligo, Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg. Tel. 0821- 419214/488149.

Centro Esperantista. Adr.: Kultura Centro Esperantista, Poŝtfako 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.

★ Biblia semajnfino

En la Abatejo Grüssau en Bad Wimpfen okazos la Biblia Semajnfino de 25a ĝis 27a de majo, Adr.: Pastro Bernhard Eichkorn, Kolpingstr. 8, D-7790 Meßkirch.

★ Seminario de Germana Esperanto Instituto

La 4a seminario okazos kune kun la aŭtuna konferenco de Baden-Virtemberga Esperanto Ligo en Konstanz de 28a ĝis 30a de septembro. Adr.: Irmtraut Bengsch, Neuhauserstr. 13, D-7750 Konstanz.

★ Kun TANEF en Suda Tirolo

Turista Asocio la Naturamikoj Esperanto Fako invitas al ferio semajno en Naturamika Domo en Dorf Tirol de 19a ĝis 26a de majo. Migrado, vizito de kasteloj, ekskursoj al Vinschgau kaj Dolomiten. Rapida aliĝo ŝparas monon. Adr.: TANEF, Poŝtfako 225, CH-4003 Basel.



★ Kongreso orientfranca

La Kongreso de Orientfranca Esperanto-Federacio okazos 5an ĝis 6an de majo 1984 en Munster (Alzacio). Adr.: Edmond Ludwig, 46 Route de la Schlucht, Stosswehr, F-68140 Munster.

★ Seminario pri moderna CSEH-METODO

La seminario estas destinita por spertaj Esperantistoj. Paralele okazos aranĝo por komencantoj. Tempo: 12a ĝis 17a de aŭgusto 1984.

La seminario okazos en kunlaboro inter Internacia Esperanto Instituto kaj Kultura

★ Internacia renkonto de infanoj

1an ĝis 7an de aprilo 1984 en Esperanto-Domo, Grésillon. Dum somero kursoj, kulturaj aranĝoj, slojdo, blinduloj. Adr.: Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé.

★ Konferenco en Baden-Virtembergo

Baden-Virtemberga Esperanto Ligo okazigos la 11an ĝis 13an de majo konferencon en la Naturamika Domo "Fuchsrain" en Stuttgart. Adr.: Helga Windisch, Dürerplatz 4/89, D-7440 Nürtingen.

🌐 23/26ajn de marto 1984:

TRIA SEJNA ESPERANTO-RENDEVUO

en Mesnil St-Père, apud TROYES (departem. AUBE - F)

Tri paralelaj studgrupoj. Prelegos interalie Pierre BABIN, Perla MARTINELLI kaj Giorgio SILFER. Muzikaj gastoj: Max-Roy CARROUGES, Jo BERGEON. - Ekzamen-sesio! - Ekskursoj. Aliĝiloj: Suzanne BOUROT, 15B, Rue Morel-Payen F-10000 TROYES

★ 11/13 ajn de majo 1984:

Kultursemajnfino ("KSF") en Sarlando
Informas: Sarlanda E^o-Ligo, Schulstr. 30,
D-6601 SCHEIDT

★ 8/12ajn de junio 1984:



NACIA KONGRESO de UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO
en BOURGES.

informas: UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS

kaj...

internacia karnavalo

📞 (29) 79 33 55

inf. kaj aliĝ.: Lidja BLOCH
12, rue des Duces F-55000 BAR-le-DUC

URGAS!!!


sciigu vian alvenon

...se vi ne jam aliĝis!

...scivigite!

Kune kun la tri departementoj "MEURTHE-et-MOSELLE" "MEUSE" kaj "MOSELLE" la departemento "LES VOSGES" konsistigas la eks-provincon "LORRAINE".

La departemento, kiu, hodiaŭ, havas la nomon "LES VOSGES", estas la antaŭ-lasta regiono, kiu estis kunligita al la reĝo-lando FRANCIO. Ĝiaj loĝantoj ne amis Francion pro diversaj kialoj: ekde 1633 ĝis 1697 (Traktato de Ryswick), ili suferis pro la mis-konduco de la duko Karlo la IVa kaj pro la armeoj de Richelieu, de Mazarin kaj de Luizo la XIVa.



Post la jaro 1737, sub la regado de la duko Stanis-lao kaj de lia intendanto La Galaizière, ili ne estis favorataj plie. En la jaro 1766 ilia regiono estis aneksita al Francio. Post la jaro 1789 ili tamen brave defendis tiun konkeron, marŝante same kiel la aliaj Francoj, al la limoj de la lando. La membroj de la Konstitucia Asembleo

dekretis, ke "LES VOSGES" vere meritis la dankon de la Patrio. En la jaro 1892, tiu departemento -kreita du jarojn pli frue- estis, inter la 87 francaj departementoj, la unua, kiu pagis impostojn; pro tio, la konsularo (1799-1804) atribuis al la "Place Royale" -reĝa placo- en Parizo, la nomon "Place des Vosges".

En la jaro 1944 La Naziaj militistoj verŝis benzinon en multnombrajn domojn de la departemento kaj forbruligis tutajn kvartalojn. La urbo Saint-Dié estis ruinigita je 75% kaj la urbo Gérardmer je 85%; la du urbetoj Corcieux kaj La Bresse estis preskaŭ tute brulintaj.

Tiu departemento ne estas tre granda: 120 km de uesto al eosto kaj 80 km de nordo al sudo. Ĝia amplekso de la surfaco atingas nur 590 000 ha; la arbaro ampleksas al 255 000 ha kaj la paŝtejoj 188 000 ha. Sed "Les Vosges" okupas grandan lokon en la franca ekonomio. Oni povas diferencigi tri regionojn:

- = la ebenaĵo iomete ondeca (okcidenta parto).
- = la "Vôge", pejzaĝo de montetoj (centra parto).
- = la montaro (orienta parto), kiu okupas la 2/5 de la tuta surfaco; ĝiaj kulminoj gradiĝas ĝis 600 ĝis 1424m.

La departemento enhavas 380 000 loĝantojn ("les Vosgiens"). Tiuj, kiuj loĝas sur la ebenaĵo vivtenas sin per tero-kultivado kaj bredado; tiuj, kiuj loĝas sur la montoj, laboras en la kotono- kaj lignoindustrioj. La loĝantoj de la "Vôge" ĉu kultivas la teron, ĉu bredas bestojn, ĉu ekspluatas la arbarojn; sed tiu centra parto de la departemento ŝatatajn termofontajn kaj turismajn staciojn.

En ĉiuj epokoj tiu departemento praktikis multoblan kultivadon kaj bredadon pro la malsamaj kvalitoj de la grundoj kaj la diverseco de la agrokulturaj kutimoj de la loĝantoj. En la valoj de Cornimont kaj de Bussang, la fontoj, multe nombraj, ebligas disigon de la loĝolokoj; ĉirkaŭ la urboj Châtenois kaj Neufchâteau staras densaj vilaĝoj kun domoj alpremitaj unuj kontraŭ la aliaj. Jam de kvindeko da jaroj oni konstatas daŭran regreson de la agroj profite al la herbejoj kaj al la arbaro. La montaranoj forlasas la kultivadon ne sufiĉe mono-donan; la nombro de la ferio-domoj pligrandiĝas, dum la herbejoj kaj la arbaroj plivastiĝas. La nombro da kultivejoj malpliĝas je 3,5% ĉiujare; la kultivistoj iom post iom maljuniĝas kaj la malgrandaj bien-farmoj estas tro multe nombraj. La lakto-produktado estas "la granda afero" de la agro-kulturo de tiu regiono. Laŭrange tiu departemento estas la dudek-tria lakto-produktanta kaj la kvara fromaĝo-produktanta. Tie oni transformas pli ol 350 000 000 da litroj de lakto ĉiujare en molan paston, en kuiritan paston kaj en paston duone premitan; la tutaĵo prezentas tre diversajn fromaĝojn kun proksimume... 190 fabriko-markoj!

.../...

La arbaro okupas gravan lokon en la tiea ekonomia vivo. Ĝi nutras milojn da familioj, kiuj tie serĉas naturajn produktojn, kiuj oni trovas en ĉiuj sezonoj: beroj, fungoj, muskoj kaj glataj ŝtonoj... en medio tre oksigeno-hava. Multnombraj farmodomoj en "Les Vosges" estas modifitaj en ferio-domojn por semajno-finoj; la natura malpliigo de la loĝantaro estus kondamnita ilin al ruiniĝo. Tiuj grandegaj arbaroj disvastiĝas ĝis la valoj kaj malebligas la pligrandiĝon de la vilaĝoj; ili elpuŝos



"Kial tiom malfrue?
- Mi estis punita...
ĉar mi ne scias, kie estas la Balono de Guebwiller...
- Kiomfoje mi diris al vi ne ludi per la piedpilko de l' kamaradoj!"

trio-produktoj; en la sama tempo oni importas 20 000 tunojn da ekzotikaj lignoj por speciala uzo. estas necese menciigi ankaŭ ma meblo-artan industrion, kiu okupas apartan lokon: seĝoj laŭ-stilaj en Liffol-le-Grand, mebloj laŭ-stilaj en Rambervillers, foteloj en Fraize-Plainfaing, granda-seriaj mebloj en Châtenois, en Hymont-Mattaincourt kaj en Mirecourt. En ĉi-tiu lasta urbeto ankaŭ la poezio trovas sian lokon; tie plu-ekzistas tre malnova metiista tradicio pri la liuto-arto, kies produktaĵojn oni eksportas en la tutan mondon.

Ekde la 15a jarcento, pro la abundaj riveraj akvoj, "Les Vosges" fariĝis granda regiono pri papero-fabrikado eksportanta siajn produktojn. Hodiaŭ, same kiel la aliaj industrioj, la papero-fabrikejoj havas seriozajn malfacilaĵojn: la akvoj ne ĉiam estas puraj, kaj la necesa energio estas nur elektra. La laborejoj estas ŝanĝitaj en raspejojn, kiuj preparas la paston por la ordinara papero kaj por la kartono; por la kontoro-papero la kemiaj pastoj venas el la skandinavaj landoj aŭ el Germanio. Oni intencas krei uzinon, kiu fabrikos ligno-celulozon por limigi la importadon kaj tiel ŝpari la devizojn. La kunigado de fabrikejoj farita jam ekde grandaj industriaj societoj trovas sian profiton en la dislokado de la produkto-unuoj. en la franca faka revuo "Entreprise" oni trovas ses papero-fabrikejojn de la departemento "Les Vosges" inter la tridek-unuaj plej gravaj laŭ la produkto-kvanto.

La industrio pri presado havas grandan aktivecon en la departemento speciale en la urbo St-Dié, kie kvar grandaj entreprenoj faras heliogravuradon, ofsetan presadon kaj presadon sur metaloj. Epinal, la ĉefa urbo, kaj ĝiaj tipaj bildoj "images d'Epinal" estas konataj en la tuta eŭropa kontinento.

IMAGERIE D'ÉPINAL, n° 7
- FRANCE -
PILLERIN Kaj K^o, Presistoj.

VENĜO DE PIK-NIKO

KOLEKTO en ESPERANTO
HACHETTE Kaj K^o, Eldonistoj
79, Boulevard Saint-Germain - PARIS



1. - Fervora ĉasistelo, hino Pik-Niko, persekutis kunklon ĵus vunditan.
Tuj kaptita, la besteto enĵetis sin en la unuan kaŝejon, kiu ĝi trovis.
Tiu ĉi loko estis... korbo nefarmita de gredoj! Fekenoj, mastenmanĝantoj sur herbo.
Post ekalito surprizo, la edzo, konfata pro la gejuo, fermis la kovrilon.

2. - Li respondis Blazolo al la ĉasistelo, kiu postulis sian ĉasojn:
"Mi ne prete ĝin, ĝi sin donis bonvoto; do, mi ĝin konservus."

3. - Ĉar Pik-Niko lasis pri sia posedajo, la edzo, por konkludi pacon, diris:
"Venu morgaŭ ĉe nin, kaj ni kunsuĝos ĝin; tiu maniere ĉi estas kontenta."

4. - Pik-Niko ne opiniis same ĝin, ĉar li konvencis, provante ne vidigi sian malkontentcon.

5. - Tien li serĉadis...

Jam de post dek jaroj la konkurso pri sonigitaj realigaĵoj ("diaporama") okazanta ĉiuprintempe allogas specialistojn pri arta fotografado de la tuta mondo.

"Les Vosges" posedas ankoraŭ tradiciojn aliajn: la ceramiko kaj la vitro-fabrikado enlokiĝis tie ekde nememorebla tempo pro la tiea ekzisto de la brul-materialo kaj de la bazaj substancoj (sablo kaj argilo) necesaj por fabriki vitron. La fabrikado de kristalaĵoj en Baccarat (en la najbara departemento "Meurthe-&-Moselle") troviĝas nur ok kilometrojn for de la limo. Oni trovas fajnajn vitraĵojn en Porcieux kaj komunuzajn en Gironcourt. (sekvota)

Ĉu rekordo?

*... Mi naskiĝis en 1893 en Damvillers (Meuse)
Mi lernis Esperanton en 1906...*

78 jarojn da Esperanto-aktiveco!... Tiu ŝajne rekorda nombro instigis nin peti intervjuon de samideano Lucien BANNIER, unu el la tri fondintoj de S.A.T.

Pol DENIS: "... Sinjoro BANNIER, vi estas sendube la veterano de la francaj esperanto-praktikantoj -vi ja naskiĝis en 1893- ... kaj samtempe mia "samdepartementano", pri kio mi aparte fieras!

Lucien BANNIER: ... *Dankon pro via komplimento pri mia aĝo... en kio mi neniel kulpas! Jes, mi estas "goujon" (1) kiel vi mem. Mi naskiĝis en Damvillers (2).*

P.D.- Laŭscie vi vizitis kiel mi la gimnazion BUVIGNIER en VERDUN...

L.B.- ... Tio elvokas en mia memoro pri la monitoro Chopin aŭ Chapin, kiu, ĉirkaŭ 1904, akompanis dudekon da gimnazianoj, piede, ĝis Damvillers, kie ili pasigis la nokton sur ŝojno kaj la morgaŭon entreprenis la duan etapon ĝis Dun-sur-Meuse, lasante en Damvillers plurajn, kies piedoj suferis!... kaj tio same plurajn jarojn.

P.D.- Mi supozas ke vi soldatiĝis iom antaŭ la eksplodo de la unua mondmilito...

L.B.- ... en 1913 mi eniris la kazernon Chevert, je 5 km oriente de Verdun... Tiam mi jam estis fervore persista pacisto, sen kompromiso kaj apenaŭ retenis mian langon, kiam, en julio 1914...

P.D.- ... Nu, pri tiu terura milito...

L.B.- ... Tuj mi komprenis, ke la Kolonelo estas fenomeno, spite al tio ke li mem generas el longa ĉeno de generaloj, kapitanoj eĉ el la epoko de Napoleono 1a. Estas li, kiu komandis tute mian Regimneton dum aŭgusto 1914, alarmis nin ĉiutage por "kuri" al iu breĉo en la fronto norde kaj oriente de Verdun... kaj ĉiuloje ni alvenis tro malfrue. Ankaŭ la sama, kiu kondukis la Regimenton (166a, 3200 homoj) ĝis Vadelaincourt, tre proksime de via Ville-sur-Cousances (3). Ni zigzagis senĉese, sen kontakto kun la "malamiko". Ekzemple la 25an de aŭgusto, ni "rekonkeris" Etain (4), nur dank' al tio, ke la Germanoj estis retiriĝintaj depost du tagoj. Sed ili revenis la morgaŭon de nia "venko".

P.D.- Kion opiniis la "superuloj" pri tiuj strangaj milit-agoj?

L.B.- Fakte la kapricoj de mia Kolonelo kostis al li gravan sankcion: komence de septembro, Joffre decidis forbalai 60 superajn oficirojn kaj sendis ilin al Limoges por konjugacii la verbon "limoger"! Mi aldonu, ke tiaspecaj Koloneloj ne svarmis... li ja eksterordinare lacigis nin sur 30 aŭ 40 km ĉiutage, kun la maksimumo de ŝarĝo sed inverse... kun la minimumo de nutrado!

P.D.- Ĉu vi havis okazon paroli pri esperanto dum tiu periodo?

L.B.- Mi ja estis fervora esperantisto depost 1906 -mi estis 13jara, kiam mi lernis la lingvon- ... ĝis mia vundiĝo (novembro) mi konatiĝis kun Serĝento-Rezervisto Louis Pergaud, iama instruisto en Bourgogne, kies verkoj tiel bone rakontas la vivon de vulpo, leporo, birdoj... Bedaŭrinde la dialogo ne estis facila, ĉar li estis fulma ŝovinisto. Laŭ li, Esperanto... "c'est de la foutaise!". Li mortis la 7an de aprilo 1915 en Marchéville ... por Patrio, do dolĉa morto por li (5).

P.D.- Vi aludis ian vundon, ĉu ne tro postulege ekscii pri tio?

L.B.- La 13an de novembro 1915 mi estis grave vundita ĉe la dekstra ŝultro. Sin sekvis ĉeestoj en hospitaloj: Haudiomont, Verdun (en "transformita" Collège Ste-Catherine, kie mi restis du monatojn), Louhans, Le Creusot, Châlon, Autun kaj fine en Paris, en "Hôpital du Grand-Palais". Nur post du jarojn de kineziterapio, mekanoterapio, kaj precipe de masaĝo mi povis lerni la skribadon per la dekstra mano. Ankorau en 1983 mi povas diri, ke "... je suis gaucher, surtout du bras droit!" Reformita en 1917 mi tiam oficiĝis en la Banko C.N.E.P. -nuntempe B.N.P.- kaj emeritiĝis en 1954...

P.D.- Supozeble vi tiatempe intensive esperantumis!

L.B.- Tuj poste sekvis kontaktoj kun esperantistoj, precipe kun Lanti kaj Glodeau kun kiuj mi fondis S.A.T., kies unua kongreso okazis en Praha en 1921. Depost tiu dato mi aktivis ĉe S.A.T.... Mi estas probable la plel maljuna SAT-ano! Almenaŭ el inter la unuaj SAT-anoj. En via departemento, mi scias, ke samideano Demissy deĵoras ĉe la stacidomo de Montmédy.

P.D.- Ĉu vi daŭre "pilgrimas" al via naskiĝvilaĝo?

.../...

L.B.- Nur depost du jaroj mi ne plu stiras aŭton pro sekureco kaj insisto de la kuracisto. Mi uzas nun fervojon, ĉar najbaro de Damvillers venas ĝis Montmédy por "kapti" min sur la kajo!

P.D.- Dankon al vi, samideano Bannier... kaj ĝis!"

NOTOJ de la intervjuo -

- (1) "goujon": familiara kromnomo de la loĝantoj de departemento MEUSE.
- (2) DAMVILLERS: 26km norde de VERDUN.
- (3) VILLE-sur-COUSANCES: naskiĝvilaĝo de la intervjuo.
- (4) ETAIN: urbeto 20km oriente de VERDUN
- (5) "foutaise"... pejorativaĵo: "fuŝaĵo"

... Estas interese konstati la evoluadon de la sinteno de Louis PERGAUD... Li ja estis profunde kontraŭmilitista kaj eĉ sennaciista! Iatempe li verkis poemon, el kiu ni eltiras la sekvantan strofon:


J'ai gardé dans mon sein ma haine tout entière...
 Pour que mon coeur gonflé de vertes énergies
 Cingle un jour au fumier pourri de leur litière
 Les dogmes et les lois, les ciels et les patries

KORESPONDA SERVO MONDSKALA (K.S.M.) grava...

La specifa Koresponda Servo de U.E.A. estas nun prizorgata de S-r° Robert LLORENS, Les Hortensias 2, Domaine des Fleurs, 121 bis, Boulevard Napoléon III, F-06200 NICE. Laŭ informo en la lasta "FRANCA ESPERANTISTO" S-r° LLORENS urĝe bezonas adresojn de almenaŭ 60 Francoj dezirantaj korespondi kun eksterlando. Oni aldonu 2 poŝtmarkojn je 2,80 FF por ĉiu petita korespondanto.

Mi ĵus sendis petojn por 6 lernantoj, ili ĉiuj revenis poŝtrevene kun dezirataj (12) adresoj de korespondemuloj en Hindio, Hungario, Japanio, Irano, Jugoslavio, Sovetunio, Argentino, Vietnamo, Brazilo kaj Peruo.

J.P. COLNOT



KORESPONDU!

S-r° BEYA CILOMBO, Paroisse Ste-Famille, BP 21, KANANGA (Zaire), perkoresponda lernanto de S-r° WICK (Strasburgo) per la Servo de UEA por Afriko jam atingis la mezon de la "kurso FERREZ". Skribu al li bildkarton (franclingve aŭ en tre simpla esperanto) por kuraĝigi lin daŭrigi sian lernadon, ĉar li estas sola esperantisto en sia lando!

"Karaj knabinoj en Francio... kaj en ĉiuj landoj!... Mia nomo estas Sandra; mi estas 10-jara knabino, loĝas en Okcidenta Germanio. Mi emas triki, bicikli kaj naĝi; kolektas poŝtmarkojn, ilustritajn bild-kartojn, plantojn. Mi serĉas 9/11-jarajn amikinojn. Bonvolu skribi al mia adreso: Sandra VOGELMANN, Steinbacher-Strasse 16, D-7151 AUENWALD 1 (RFA) (aŭ... Germana Federacia Respubliko).

(noto: memkompreneble, iu "plenkreska onkl(in)o" estas petata kuraĝigi Sandra per tutamika letero...ilustrita!)



★ 43.a KONGRESO DE L'ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCO

sabaton la 5-an kaj dimanĉon la 6-an
de majo 1984

VI ANKORAŬ POVAS PARTOPRENI! UZU LA ALTIĜILON
ENŝOVITAN EN LA LASTA N° (44) DE LA INFORMILO


SE VI NE HAVAS EBLECON PARTOPRENI AL NIA KONGRESO
BONVOLU PLENIGI LA KUNMETITAN "BON POUR POUVOIR"...

kaj sendu ĝin al nia kasisto: A. GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

aŭ al iu ajn partoprenonto,
kiun vi konas.



grava informo



Ni taksas ja diskoniginda la iniciaton de "I.C.E.M.-E°-Komisiono" organizi renkontiĝon en nia regiono. I.C.E.M. signifas "Institut Coopératif de l'Ecole Moderne", kies fondinto estis la fame konata pedagogo Célestin FREINET (unu el liaj verkoj estas tradukita en esperanto: "Les dits de Mathieu... La diroj de Mateo").

Tiu multfaceta renkontiĝo okazos de la 8a de julio ĝis la 19a de julio 1984, en "Le Relais des Etangs", Languimbert, F-57810 MAIZIERES-lès-VIC.

Celo: diskonigi esperanton al Freinet-geinstruistoj... sed ankaŭ informi la esperanto-praktikantoj pri la Freinet-pedagogio.

Tre riĉa programo: E°-kursoj diversgradaj eĉ por infanoj, diversaj taĉmentoj laŭ deziro de la ĉeestantoj, interparoladoj, ekskursoj, distraj aktivaĵoj...

Speciala alvoko: Oni nepre bezonas spertajn esperantistojn kaj Lorenanojn por vizitigi la regionon...

Eksterlandanoj estas bonvenaj!! - Loĝado en 4/6 litaj ĉambroj aŭ libera kampado sur la apuda herbejo. Ni povas certigi al vi eksterordinaran etoson, kiun jam konas la "Freinet-Edukistoj"... VENU kaj ĜUU!



Por ĉiuj informoj, aliĝiloj kaj kunlaboranoncoj skribu al: Isabelle BECK, 4, Rue de Neufchef, RANGUEVAUX F-57700 HAYANGE.

Monato Monato* Monato Monato* Monato Monato* Monato Monato* Monato Monato***

Monato

Monato

Monato

Monato

Monato

Monato

Monato

Monato



"Imagu, ke Sr° "X", nia bona samideano ne ankoraŭ abonis MONATO-n...
- Nekredeble! Vi ŝercas!... Ĉu la klubanoj tion scias?
Absolute ne! Ni ne diru tion al ili, ili kapablus organizi mon-kolekton por abonigi nian samideanon... kaj vi ne ignoras, ke li ja estas fiera!..."

KIO ESTUS LA CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO EN 1987 SEN UNU EL LA PLEJ PRESTIĜAJ ESPERANTO-REVUOJ... MONATO ?

LA SORTO DE MONATO -VIVI AŬ MORTI- DECIDIĜOS EN 1984, LA KVINA JARO DE MONATO.

VI POVAS KUNDECIDI: NE NUR MEM REABONU, SED ANKAŬ VARBADU, VARBADU, VARBADU POR ĈI-TIU UNIKA MAGAZINO!

nur 145F!!
abono pere de:
CLUB D'ESPERANTO de METZ
36, rue St-Marcel 57000 METZ



BON POUR POUVOIR

JE TRANSMETS MON POUVOIR POUR ME REPRÉSENTER
LORS DE L'ASSEMBLEE GENERALE DE LA FÉDÉRATION À MUNSTER
À MONSIEUR (MADAME, MADEMOISELLE) _____

QUI PARTICIPERA AU CONGRÈS.

NOM
ADRESSE

DATE ET SIGNATURE:

nos cotisations 1984

Vous venez de recevoir notre bulletin d'information sur l'espéranto, "LA INFORMILO". Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez le recevoir régulièrement (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 1984 et nous vous invitons à les payer dès maintenant.

Nous espérons vivement vous retrouver parmi nos abonnés ou nos membres!

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national, tant dans le domaine de l'information en général que dans celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT

- 1/ Les cotisations à l'U.F.E. et à l'U.E.A. (catégories 3 et 4, colonnes encadrées) sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 855 35 D PARIS, en y joignant votre bulletin d'adhésion. Votre adhésion à notre Fédération est comprise dans les cotisations de l'UFE, par contre, l'abonnement à LA INFORMILO reste à payer à notre Fédération. Voir ci-après.
- 2/ La cotisation à la FEDERATION CULTURELLE DE L'EST ainsi que l'abonnement à LA INFORMILO sont à payer:
 - = de préférence par virement postal à FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPERANTO
CCP: 1997 72 W NANCY (pratique et sans frais)
 - = par chèque bancaire à l'ordre de cette même Fédération... mais ce chèque est à envoyer à notre trésorier: A. GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
- 3/ Exceptionnellement, les membres du groupe de Strasbourg sont priés de verser leur cotisation au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, CCP: 49917 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au groupe local (15F), ou directement à leur trésorier, B. REIFFSTECK, 4, rue de Neuchâtel, 67000 STRASBOURG. Joindre votre bulletin d'adhésion spécifique pour les cotisations de l'UFE.

CAT. TABLEAU DES COTISATIONS 1984

- 1 = abonnement simple à LA INFORMILO
- 2 = adhésion simple à la FEDERAT. CULT. DE L'EST
 - * membre fédéral (avec abonnement à LA INFORMILO)
 - * membre fédéral (sans " ... pour les autres membres de la famille par exemple)
- 3 = adhésion à la FEDERATION et à l'U.F.E.
 - * membre simple
 - * membre abonné "junior" (avec la revue de l'UFE, "FRANCA ESPERANTISTO")
 - * membre abonné "senior" (avec la revue de l'UFE)
 - * membre abonné (conjoint)
- 4 = adhésion à la FEDERATION + U.F.E. + U.E.A.
 - * membre "individuel" (reçoit "Fr. Esp." + annuaire de UEA + la revue "KONTAKTO"... si moins de 26 ans)
 - * membre "individuel" (reçoit "Fr. Esp." + annuaire de UEA + revue mondiale "ESPERANTO" + revue KONTAKTO si moins de 26 ans)

	moins de 22 ans	plus de 22 ans
	22F	22F
	16F + 22F	16F + 22F
	16F	16F
	60F + 22F	60F + 22F
	140F + 22F	60F + 22F
		155F + 22F
		70F
	216F + 22F	231F + 22F
	330F + 22F	231F + 22F
		345F + 22F
		345F + 22F

IMPORTANT

- A - Tous les membres reçoivent la carte fédérale (s'ils sont nouveaux adhérents) et la revue trimestrielle régionale LA INFORMILO (... s'ils sont abonnés)
- B - Les membres de l'UFE et de l'UEA reçoivent en plus les cartes de membre de ces associations (s'ils sont nouveaux adhérents) et les coupons 1983 donnant droit au service des délégués mondiaux dont l'adresse se trouve dans l'annuaire de UEA.
- C - Les membres de l'Enseignement sont invités à mentionner leur profession; ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (G.E.E.)... sauf catégorie 2.
- D - Les jeunes gens jusqu'à 25 ans voudront bien mentionner leur date de naissance; ils seront ainsi inscrits d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANC. (J.F.E.O.) sauf catégorie 2. Ils recevront alors en plus la revue "KONCIZE" et le bulletin interne national "JEFO informas".

FAITES VIVRE VOTRE PRESSE... **abonnez-vous!**

Toutes ces revues sont entièrement rédigées en E°. Celles dont le titre est précédé d'une croix sont à régler directement à U.E.E. 4bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS CCP 855-35 PARIS. Les autres pourront être réglées à notre trésorier qui transmettra.

(chèque au libellé de la Fédération, envoyé à A. GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM F) Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto - CCP 1997-72 V NANCY

+ ESPERANTO	revue offic. de UEA	abonnement simple	mensuel	114 F
+ KONTAKTO	revue pour adolescents et jeunes gens		4 n°s	57
KONCIZE	bulletin européen pour jeunes gens		6 n°s	30
KULTURAJ KAJEROJ	revue culturelle		6 n°s	60
+ HEROLDO DE ESPERANTO	revue d'inform. format journal		18 n°s	80
+ HOMO KAJ KOSMO	revue de vulgarisat. scientifique.		4 n°s	15
+ LITERATURA FOIRO	revue littéraire		4 n°s	80
+ MONATO	magazine international		11n°s	145
+ JUNA AMIKO	style simple - parfait pour débutants		3 n°s	20
MONDA KARUSELO	nouveau magazine en E°		4 n°s	
HORIZONTO	revue du "mouvement neutre" E°			75
LA MIGRANTO	bulletin des "amis de la nature"			30
+ SCIENCA MONDO				30
+ INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO				50
+ EUROPA DOKUMENTARO				56

Les revues ci-dessus peuvent être considérées comme neutres vis-à-vis des dogmes politiques ou religieux.

Celles qui suivent sont généralement qualifiées "d'engagées"

+ BIBLIA REVUO				50
+ OOMOTO	revue japonaise (philos. relig.)		6 n°s	42
ESPERO KATOLIKA				70
FRANCA KATOLIKA	ESPERANTISTO			30
+ DIA REGNO	internationale (protestante)			67
SAT-AMIKARO	bulletin mens. des trav. et syndic. franç.			90
SENNACIULO	même tendance mais international			130
+ EL POPOLA ĈINIO	de Chine Populaire - en couleurs		1 an	40
			2 ans	68
			3 ans	96
+ LA KANCERKLINIKO	d'avant-garde, politique et culturel		4 n°s	55



Vous pouvez également vous procurer des vignettes gommées (4x3cm) de couleur verte. Chaque feuillet comprend 9 vignettes de textes différents: 2 feuillets 3,50F + 1,60F d'affranch. si non accompagné d'une autre commande. 10 feuillets 17F (franco). 25 feuillets 40F (franco)

Ont également un grand succès des CARTES DE VISITE qui présentent succinctement l'Espéranto. On y trouve l'adresse de UFE et un espace blanc vous permet de personnaliser votre envoi: 8 cartes 6F; 20 cartes 12F.

Figure aussi sur notre catalogue le "Lexique" bien connu de F. LEGER (Espéranto-Français). 1 ex. 8,90F (franco) - 2 ex. 15,80F - 5 ex. 28,50F - 10 ex. 42,10F - 20 ex. 47,50F.

"FACILAJ DIALOGOJ" par A. Lienhardt. 12 dialogues vivants en E° et en français, pour apprendre rapidement à parler la Langue Internationale. Nombreuses questions et réponses didactiques complémentaires. Cassette d'accompagnement avec enregistrement des textes en E°: Le livret seul 29F (franco) - La cassette 33F.

"ESPERANTO, une approche de la Langue Internationale": petite brochure de 60 pages, éditée par l'U.F.E.: 10 F (franco)

NOTE: Ces prix pourront être éventuellement réajustés en fonction d'une variation des tarifs postaux.

D-r° ZAMENHOF admonis: ... "Ni povos venki nur se ni zorgeme konservos al nia lingvo ĝian simplecon kaj facilecon."

Detalan vojo-montrilon kia-maniere obei laŭ-eble ĉi-tiun gravan admonon vi trovos en la aktuala verko de A. LIENHARDT: "Por multoble pli-vastigi nian movadon, ni ĉiam uzu nur Esperanton tre facile kompreneblan!"

Rezulto de la spertoj akiritaj far la aŭtoro dum lia 50-jara aktiveco kiel gvidanto de kursoj, kontrolanto de manuskriptoj kaj verkanto de libroj kaj de nombro da artikoloj. La libro: 22 FF (afrankite) = 2 kasedoj: 66 FF (afrankite)

psstt!... momenton ni petas!

Se vi jam pagis vian kotizon por ĉi-jaro, vi trovos en ĉi-tiu n° kelkajn aldonitajn glu-markojn.
NOVAJ U.F.E.-membroj aparte ricevas la membro-kartojn.

- 1/ Jarmarko por ĉiuj niaj membroj (federaciaj kaj aliaj). Vi gluu ĝin dorse de via federacia Membro-karto. (Tiucele vi forigu la sub-paperon... la marko estas memgluebla).
- 2/ Jarmarko por la U.F.E.-membroj; ĝi estas rozkolora por la simplaj membroj, kaj blua por la individuaj membroj. Vi gluu ĝin sur via U.F.E.-membro-karto.
- 3/ La membro-marko-folio de U.E.A. konsistas el = membro-markoj uzendaj por rilati kun UEA-delegitoj; tiuj m.m. atestas vian membrecon (peco gluenda sur ĉiu pet-letero al iu ajn delegito, kies nomo kuŝas en la "JARLIBRO").
= la jarmarko por la UEA-membroj. Vi eltondu ĝin kaj surgluu sur via UEA-membro-karto.

Se vi ne ankoraŭ pagis vian kotizon aŭ vian abonon, vi malkovros en ĉi-tiu bulteno novan kotiztabelon kaj memorigilon, per kiu vi povos informi nian kasiston pri via kotizo. Jam ne prokrastu vian decidan kaj urĝe pagu vian kotizon. Ni memorigas al vi, ke ĉi-tiu n° de LA INFORMILO estas la lasta sendita al vi ne renovigas vian abonon.

Orientfranca
Eo-Federacio
1984

UFE 1984

U
E
A
1984
U
E
A



Se via pago interkruciĝis kun la sendo de tiu-ĉi INFORMILO, tiam intertempe via abono ordiĝis kaj la kunsendita alvokilo ne plu koncernas vin!

MEMBROMARKO
UEA 1984

AL NIAJ EKSTERLANDAJ ABONANTOJ

En la antaŭa n° de LA INFORMILO (n°44) aperis granda kotiz-tabelo, "bedaŭrinde" francelingve, pri la kotizoj kaj abonoj por 1984. Tial ni deziras aparte informi al vi, ke la abono al LA INFORMILO por 1984 estas 30FF aŭ 12 internaciaj kuponoj ('respond-kuponoj' aĉeteblaj ĉe ĉiu Poŝt-Oficejo).

Se vi ne jam pagis vian abonon por la nova jaro, bonvolu fari tion sen prokrasto.

Vi povas pagi per simpla poŝta ĝiro al nia Poŝt-Ĉek-Konto: FEDERATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO = PCK° 1997-72 W NANCY aŭ per sendo de 12 I.R.K-oj al nia kasisto: S-r° André GROSSMANN, 5, Rue des Pyrénées, F-68390 BALDERSHEIM.

Krome ni deziras informi vin, ke ĉi-tiu n° (45) estas la lasta sendita al vi, se vi kiel eble plej frue ne renovigos vian abonon.


Se vi jam pagis vian abonon, tion vi povas kontroli jene: kiam supre de via adreso sur la banderolo troviĝas kod-numero, kiu komencas per 4 (ekz. 4A63), tiam vi povas esti certa, ke via abono por 1984 estas pagita.

la kasisto, A. GROSSMANN

Al niaj korespondantoj kun kiuj ni interŝanĝas nian federacian bultenon "LA INFORMILO", ni petas, ke ili sendu sian propran bultenon rekte al la redakto, kies adreso kuŝas ĉi-sube. Antaŭdankon!

LA INFORMILO - Redakto - P. DENIS, 5, Chemin de Blamecourt
F-55000 BAR-le-DUC

karaj junaj
geamikoj



J E F O (Junulara Esperantista Franca Organizo),
la Orientfranca Esperanto-Federacio kaj
la Esperanto-grupo de Bar-le-Duc INVITAS VIN al

internacia junulara KARNAVALA SEMAJNFINO EN BAR-LE-DUC

16 a ĝis 18 a de marto, 1984

se vin allogas internacia junulara etoso en historia urbeto, interkonatigaj distraĵoj, ludado, kantado kaj muzikado kun la hungaro Feri Floro, maskobalo, partopreno en urbaj karnaval-procesioj...

Aliĝu skribante viajn nomon, aĝon, alventempon kaj veturrimedon, kaj pagante min. 30 F al Lidja BLOCH,
11 rue des Ducs de Bar 55000 BAR-LE-DUC
aŭ telefonu: (29) 76 11 28 (vespere)

KOTIZO: 110 F (80 F por eksterlandanoj);
per tiu eta pago vi partoprenos la programon kaj la manĝojn de vendredo vespere ĝis dimanĉo vespere; vi tranoktos ĉe esperantistoj aŭ amas-loĝeje laŭ via prefero; vi povos gastigi antaŭ kaj post la karnavalo.

Gravajn informojn pri la programo, la komuna temo de la Esperanto-grupo en la maskopromenado kaj la maniero atingi la ejon vi ricevos en alia bulteno post via aliĝo.

BONVOLU NOTI CETERE...

19-25/4: Internacia Junulara Festivalo en Rimini (Italio)

20-23/4: Tute Natura Pasko en Nederlando (arbaro Bennekom)

26-27/5: junulara Semajnfino proksime de Parizo

8-17/6: Internacia Luda Seminario en Norda F.R.Germanio

30/6-2/7: Internacia Renkontiĝo en Parizo

2-6/7: Biciklado Parizo-Boulogne/mer; enŝipiĝo al Douvres

7-13/7: Biciklado Douvres-Swanwick (Anglio)

13-20/7: Internacia Junulara Kongreso en Swanwick (proksime de Derby, Nottingham) pri "Homo kaj maŝino"

12-19/8: INTERNACIA RENKONTIĜO en LE HAVRE (76), pri "malŝato inter popoloj"; aparte malmulte-koste por gejunuloj; vojaĝsubvencioj por JEFO-anoj.

Pri ĉiuj tiuj aranĝoj informas JEFO, 4bis rue de la Cerisaie
75004 Paris



? U

distrig angelo



* KRUCVORTENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1											
2											
3											
4											
5											
6											
7											
8											
9											
10											
11											

HORIZONTALE

1 Doni ion kontraŭ ion alian. 2 Levkojo - iu. 3 Platformo fiksitita sur masto - cetac'. 4 Danĝera gas' - nokta birdo. 5 Cirklo forma pec' - specio de viburno. 6 Pli malpli aro - prefikso valorpaper'. 7 Likvoraromig' - adverbo - araba ŝtatfunkciul'. 8 Miksaĵo - ŝlosita kesto. 9 Variigil' por kurent-intenso - pronomo - konjunkcio. 10 Metal' - akre boji - templongec'. 11 Vegetala armil' - ŝipĉeftrabego - monunu'.

VERTIKALE

1 Mezozoika rampulo. 2 Arta kaŭĉuk' - gasa miksaĵo. 3 Kiel karakteriza modelo - marĉtrapasiloj - 4 Elemento de tutaĵo - rabobirdo - prepozicio. 5 Maloftigi (R) - karesform' por "onklo". 6 Mallonga enskrib' - larĝa zono - sovaĝa celeri. 7 Aĥeronti' - profita, helpa (R). 8 Specio de strig' - insekto. 9 Plezursentad' - Romana dio - prepozicio. 10 Por Instrument' - aro de membroj - je la dua rango. 11 Malnova mezurunuo - taŭgeckred' - kampa bird'.

bobirdo - prepozicio. 5 Maloftigi (R) - karesform' por "onklo". 6 Mallonga enskrib' - larĝa zono - sovaĝa celeri. 7 Aĥeronti' - profita, helpa (R). 8 Specio de strig' - insekto. 9 Plezursentad' - Romana dio - prepozicio. 10 Por Instrument' - aro de membroj - je la dua rango. 11 Malnova mezurunuo - taŭgeckred' - kampa bird'.

SILABENIGMO

Pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj "silaboj", malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. la 1a kaj 3a kolonoj, vertikale legataj, formas proverbon.

ab ag aĵo al an ano ar rao at bi da dak di do do dro en en eo ep er er fo ga ga ibi id io iso iz jek jo ke ki ko kot kso la le le li lo mio mio mo ni no no noj ob ol op oro ra re rk ro ru ru si so spe su ŝko ta ta te ti ti to to to tu tu ug ul ùn ur va va

- | | | |
|----|-------------------|--|
| 1 | + - + - - - - | rostita ripaĵo |
| 2 | + - + - - - - | iama sankta birdo |
| 3 | + - + - - - - - | sud-amerika respubliko |
| 4 | + - + - - - - | surhaŭta desegnaĵo |
| 5 | + - + - - - - - | balenoptero |
| 6 | + - + - - - - - - | surkomputera manipulisto |
| 7 | + - + - - - - | mankas al ĝi haŭtopigmento |
| 8 | + - + - - - | |
| 9 | + - + - - - - - - | epidemia malsano |
| 10 | + - + - - - - - - | laŭrita edziĝo en la sino de sia klano |
| 11 | + - + - - - - - | rivero |
| 12 | + - + - - - - | en boksomatĉo |
| 13 | + - + - - - - | amatino de Tristano |
| 14 | + - + - - - | anserbleki |
| 15 | + - + - - - - | manko de volpovo |
| 16 | + - + - - - - | hazardludo |
| 17 | + - + - - - - | rusa veturilo |
| 18 | + - + - - - - - - | lensa muntaĵo |
| 19 | + - + - - - - | naŭa tago ĉe la Romanoj |
| 20 | + - + - - - - - - | arto instrui |
| 21 | + - + - - - - | tute ne inteligenta |
| 22 | + - + - - - - | ferdekdomo |
| 23 | + - + - - - - - - | enintesta diastazo |
| 24 | + - + - - - - | malmola kuketo |
| 25 | + - + - - - - | emblemo |
| 26 | + - + - - - - | teksistino |
| 27 | + - + - - - - - - | streĉiga momento en filmo |

MALKOVRU LA KODON...
kaj sekve la bildo-klarigon!



"Of rspzù sfolùmrjhj!...
...bolbv nj ŝrfsujŝ ĝmbĉrmùzpo!"

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ:

KRUCVORTENIGMO: ŝagrino moŝto amendi rusto plug efemera rea gelo lern altano ŝir nia zostero loes upup revizi ti sfera edil ro oero lez eol fiorestro iono opini ial faul melon grund do

SILABENIGMO: "Per pacienco kaj fervoro sukcesas ĉiu laboro".